



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Mendu jam nun ! Ĉe libroservo Pickel!

La Olimpika broŝuro

de Montrealo

baldaŭ haveblas!

Prezo 6,20 GM

Eldanto/Herausgeber

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 33/76 - 16 aŭg 1976
Aperas ĉiusemajne

Ferma kunsido de la 61-a Universala Kongreso en Ateno

Pri la kongresaj laboraj kaj rezolucioj

Ateno/Varsocio (pp-pola radio) - Sabate, la 7-an de aŭgusto 1976, centoj da kongresanoj kolektiĝis en la salono Grabowski por partopreni la solenan fermon de la kongreso.

D-ro Humphrey Tonkin, la prezidanto de UEA, prezentis la tagordon kaj informis, ke salutojn sendis al la kongreso, i.a., la prezidanto de la komitato de Ne-registaraj Organizoj ĉe UNESKO, kiu deziras sukceson al la kongreso, kaj la afersarĝito de la finna ambasadorejo, kiu telegrame esprimis bondezirojn por la grava laboro por progresigi la internaciajn rilatojn.

Raporto pri la kongresa laboro.

Por la jam forvojaĝinta ĝenerala sekretario, s-ro Wensing, la laboran raporton prezentis d-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA. Laŭ tiu raporto la kongresa laboro okazis sur kvar diversaj niveloj: Komitato, estraro, pleno de la kongreso kaj laborgrupoj.

Pri la komitato: La komitato kunsidis dum 12 horoj kaj faris vere gravajn ~~decidojn~~, kiuj estos ankaŭ interesaj por la estonta irado de niaj aferoj. La komitato akceptis ĉi tie novan proceduron pri la labormaniero de la komitato, kiu pliraciigis kaj plifaciligis ties laboron. La komitato aprobis la estraran raporton.

La estrarano komisiita raporti pri la statutoj de la unuopaj landaj asocioj faris raporton kaj evidentiĝis post zorga traradado kaj detala diskutado, ke ĉiuj landaj asocioj havas statutojn, kiuj plene rekonas la necesan neŭtralecon de UEA.

Apartan atenton ricevis projekto de nova statuto, pri kiu la komitato parolis en aparta kunsido kaj evidentiĝis, ke la principaj kaj fundamentaj punktoj kiel ekz. la neŭtraleco estas ekster diskuto. Sed estis demandoj pri la proporcio inter la komitatanoj senditaj de la landaj asocioj kaj elektitaj de delegitoj aŭ ĉu eble eĉ de membroj, kaj pri tiuj aferoj kiuj gravas ĉe la konsisto de la komitato, sed ne tuŝas la bazajn principojn de UEA.

La komitato akceptis la interkonsenton kun ILEI, la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj. Tre kontentige progresas ankaŭ la laboro por la repacigo inter UEA kaj kelkaj membroj aŭ eksmembroj. Tute nova epoko regas jam de Kopenhago, konstatis la raportanto, kaj ĝi daŭre pliboniĝas.

La komitato akceptis dum la kunsidoj en Ateno tri novajn landajn asociojn, nome tiun de Suda Koreujo, la asocion de Germana Demokratia Respubliko kaj la asocion en Slovakujo. Tiuj asocioj, kies aliĝpetoj jam pli frue troviĝis sur la tagordoj, skribe rekonis la absolutan validecon de la statuto de UEA, kio ankaŭ entenas la eldiron pri la rekonado de la neŭtraleco de UEA, kio signifas, ke UEA ne prenas starpunkton en politikaj aferoj. Kompreneble la komitato konscias, ke ĉiu landa asocio estas submetita al la cirkonstancoj kiel ili regas en la respektivaj landoj.

Komitato (daŭrigo)

La komitato ankaŭ elektis elektokomisionon, kiu konsistas el la komitatanoj Anjer, Norvegujo (gvidanto), Aleksiev (Bulgario) kaj Kuhlmann (Danlando).

Okazis diskuto pri la venontaj kongresoj. 1977 la kongreso okazos en Rejkjaviko, Islando. Kiel temo de la kongreso estis proponita unu el la proponaro el la konferenco de Helsinki. 1978 la kongreso estos en Varna, Bulgario. Pri la kongreslokoj de la pli venontaj jaroj ne jam estis farita decido. Formala invito venis el Luzern, Svislando.

La estraro kunsidis dum noktaj horoj, ĝi preparis la kongresan programon kaj diskutis la proponojn al la komitato.

Decidoj en la pleno. La kongresanoj havis tri eblecojn por partopreni en la kongresaj laboroj: La du ĝeneralajn kunvenojn de UEA kaj la podian diskutadon. En la 1-a kunveno oni pritraktis la estraran raporton. Evidentiĝis el la decidoj kaj aplaŭdoj ke regas ĝenerala kontenteco pri la interna etoso. D-ro Bormann laŭde elstarigis la fakan laboron de la fervojistaj esperantistoj. La nova financa programo de la Esperanto-movado, kiu celas aliri eksterajn financajn fontojn, trovis akcepton kiel bona kaj kontentiga solvo de la problemoj de la Esperanto-movado. Okazis diskuto pri la samtempa okazigo de la UEA- kaj SAT-kongresoj kaj pri la TEJO-kongreso.

La 2a ĝenerala kunveno traktis la temon "Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo" en formo de podia diskutado. Partoprenis en la diskutado reprezentanto de la laboristaro en la komuna merkato, krome G. Leon-Smith, Britio, kiel eksperto pri la parlamenta agado, Rudi Graetz, la nova komitatano de Centra Laborrondo Esperanto de GDR, kiel konanto de la situacio en la socialismaj landoj, prof. d-ro Helmar Frank, Paderborn, FR Germanio, kiel konanto de la situacio en la okcidentaj landoj, kaj Renato Corsetti, Romo, kiel scianto de la situacio en la tria mondo. Ĝenerala konkludo el la 2a kunveno estis, ke la lingvaj problemoj en la regionaj unuiĝoj pliakriĝas, speciale en la okcidenta post la aliĝo de Greklando al la komunumo.

Plia podia diskutado traktis la temon "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto?" sub gvido de estrarano Swistak, Pollando. Oni diskutis pri la 12 antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto laŭ la UEA-konsilaro n-ro 5. Oni povis pritrakti nur 5 antaŭjuĝojn. La diskutadon oni daŭrigos en venontaj kongresoj.

Laborgrupoj. En la kunsidoj de la komitatkomisionoj partoprenis ankaŭ kongresanoj, kio pozitive influis tiujn kunsidojn. Okazis kunsidoj de respondeculoj de landaj asocioj, de fakaj organizoj, kunveno de virinoj kun tre efika laboro.

Entute okazis ĉ. 100 kongresaj eroj. Krome okazis interparoloj kun gravuloj de oficialaj instancoj, de la urbo kaj ministerioj, kontaktoj kun naciaj ambasadoj kaj presagentejoj. Fine d-ro Bormann ankaŭ atentigis pri la labora aspekto de la kulturaj aranĝoj, almenaŭ fare de la agantoj.

La kongresaj rezolucioj

La kongreso akceptis tri rezoluciojn, du eksterajn kaj unu internan. La unua sin turnas al la regionaj unuiĝoj, al la ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj utiligi Esperanton kiel pontolingvon, kiel rimedon por senpera kontaktado inter ordinaraĵ civitanoj de najbaraj landoj ktp.

La dua rezolucio fakte estas gratulmesaĝo al UNESKO, kiu festos la 4-an de novembro 1976 la 30-an datrevenon de sia fondiĝo.

La 3-a rezolucio fine elstarigas la ankoraŭn validecon de la Principaro de Frostavallen kaj alvokas al uzado de modernaj informaj metodoj.

Sekvis i.a. dankesprimoj fare de la UEA-prezidanto al la LKK, al la grekaj instancoj, al du profesiuloj de la Centra Oficejo, d-ro Victor Sadler kaj Simo Milojević, kiuj samtempe estas LKK-anoj, kaj sekvis la invito al la 62-a UK en Rejkjaviko fare de Baldur Ragnarsson.

Fine en mallonga parolado d-ro H. Tonkin resumis la trajtojn de la ĉi-jara kongreso. Li aparte emfazis la laboron farita dum la kongreso, sed ne nur en la senco, ke okazis multaj kunsidoj, sed ke la homoj venis al tiuj kunsidoj kaj partoprenis en ili. Tonkin elstarigis la "elverŝon de helpo al UEA, kiu venis el la anoj de la asocio kaj de la esperantistoj ĝenerale." Sed laŭ Tonkin ne temas nur pri elverŝo de helpo, sed ankaŭ pri elverŝo de kunlaboro, pri kontribuoj ne nur al la laboroj, sed ankaŭ kontribuo al la ideoj de la Esperanto-movado kaj de la asocio. Kaj laŭvorte la UEA-prezidanto konstatis: "Vi kiel anoj de la nuna kongreso kaj kiel anoj de UEA montris vin aparte engaĝitaj en la laboro de la asocio. Per tio la kongreso fariĝis ne nur evento, kie la homoj kunvenas kaj renkontas malnovajn amikojn kaj formas novajn amikecojn, sed ĝi ankaŭ estis kongreso, renkontiĝo en kiu la laboro de UEA iris unu paŝon antaŭen. Kaj se la laboro de UEA iras unu paŝon antaŭen, laŭdifine, laŭ niaj celoj, tio signifas ke la sukceso de Esperanto iris unu paŝon antaŭen." Per la kantado de la himno finiĝis la ferma kunsido kaj la kongreso!

La ĉi-supra raporto estis kunmetita surbaze de la sonraportoj de la speciala sendito de la Pola Radio al la kongreso, Jerzy Grum. La sonraportoj estis disaŭdigataj dum la Esperanto-Ekspreso dimanĉe, la 15-an, kaj lunde matene, la 16-an de aŭgusto. Pilo-Press dankas al la Pola Radio pro tiu unika aktuala raportado!

Pri la Olimpikaj Ludoj en Montrealo

Montrealo (pp) - En la Olimpikaj Ludoj de Montrealo deĵoris oficiala gastigantino (gvidantino, hostess), kiu parolis Esperanton apud kvar aliaj lingvoj - f-ino Margaret Lola Ronald. Dum la Ludoj okazis vespera kunveno de esperantistoj, kiun ankaŭ ĉeestis ambasadoro Ralph Harry kaj Guido Bertucci, deĵoranto en la Sekretariato de UNO.

Kiel ni jam sciigis, okaze de la Ludoj estis disdonitaj 13 000 ekzempleroj de la broŝuro "Esperanto, Internacia Lingvo de Amikeco" eldonita en la franca, angla kaj Esperanto. La tekstoj estis ankaŭ tradukitaj - en aldonoj - en la germana, hispana, itala, nederlanda, portugala, finna kaj laŭdire en la hungara. Kelkaj el tiuj lingvoj - laŭ informo de la Olimpika Komitato de Kanada Esperanto-Asocio - atingis multajn landojn: la germana 6, la hispana 20, la portugala 2.

Baldaŭ la broŝuro estos havebla en Eŭropo. La prezo estas 6,20 GM. Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Jarkunveno de GEFA

Paderborn (pp) - De la 15-a ĝis la 17-a de oktobro okazos la 20-a Jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) en Paderborn, "Paderhalle/Schützenplatz". Aliĝoj atingu ĝis la 31-a de aŭgusto la komisiiton, s-ro Günter Bartz, Wellingerhofer Str. 195 d, D-4600 Dortmund. Gastoj el eksterlando petu aliĝilojn de GEFA, sekretario Joachim Schropp, Schmittingheide 17, D-4400 Münster. Okazos Esperanto-ekspozicio, laborkunsidoj, matineo, festvespero kaj danco, ekskurso tra la Teŭtburga Arbaro.

Trilanda renkontiĝo

Düren (pp) - La Aŭtuna Trilanda Esperanto-Renkontiĝo de la esperantistoj el la limregionoj de Belgio, Nederlando kaj F R Germanio okazos dum la 9-a kaj 10-a de oktobro 1976 en la junulargastejo de la urbeto Nideggen apud Düren.

Pliaj informoj estas haveblaj de s-ro Franz Jodozi, Oberstr. 77, D-5165 Hürtgenwald, F R Germanio.

Oberkirch - Ekspozicio kaj Jubileo

Oberkirch (pp) - La 31-an de julio estis malfermita dum solena inaŭguro la granda ekspozicio pri "Grimmelshausen kaj lia epoko", kiun oni kompilis okaze de la 300-a datreveno de lia morto. La sama ekspozicio antaŭe estis montrita en Münster, kie ĝin vidis 55 000 vizitantoj.

Unu parto de tiu ekspozicio temas pri la tradukoj, sub kiuj ankaŭ troviĝas ekzemplero de Germana Esperanto-Revuo resp. Eŭropa Esperanto-Revuo kun Esperanta traduko el la Simplicissimus. La Esperanto-traduko estas notita ankaŭ sur listo kun mencio de ĉiuj tradukoj. Pri la Esperanto-traduko kaj ĝiaj verkintoj el Oberkirch la kreinto de la ekspozicio, prof. Berghaus (Westfälisches Landesmuseum für Kunst und Kulturgeschichte) aparte atentigis dum la unua prezentado tuj post la inaŭguro.

La 22-an de aŭgusto 1976, la urbo Oberkirch festos la 650-an datrevenon de la ricevo de 1' urbaj rajtoj. Tiun jubileon la urbo grand-skale festos. Altrangaj personoj venos al Oberkirch, kaj per procesio kun historiaj kostumoj kaj prezento de okazintaĵoj el la pasintaj jarcentoj oni memorigas pri la iama vivo en Oberkirch.

Oberkirch fariĝis jam delonge konata en Esperantujo pro la vigla, kvankam malgranda Esperanto-grupo. Jam okazis en Oberkirch du germanaj Esperanto-kongresoj, la urbo havas Esperanto-straton kaj la grupo fleugas internaciajn kontaktojn.

Esperanto-vivo do estas parto de la 650-jara urbo, estas konvene, ke ankaŭ esperantistoj esprimu bondezirojn al la urbo kaj ĝia urbestro, s-ro Erwin Braun. Pilo-Press kore gratulas!

La adreso: Stadt Oberkirch, urbodomo, D-7602 Oberkirch, F R Germanio.

Esperanto en la radio

Varsovio. La dimanĉaj posttagmeza kaj vespera, kaj la lunda matena elsendoj de Pola Radio estis plene dediĉitaj al la Esperanto-Ekspreso kun la preskaŭ kompleta ferma kunsido de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno. Favore al Esperanto-temoj la redakcio rezignis pri "Trarigardo de internaciaj eventoj" kaj "Trarigardo de soci-kulturaj gazetoj". Tio meritas la specialan dankon de la esperantistoj. La dimanĉa Esperanto-anguleto kadre de la germana programo temis pri la SAT-kongreso en Gotenburgo laŭ raporto de nederlanda aŭskultanto. - De la 15-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto la Esperanto-redakcio ricevis 365 korespondaĵojn.

Vieno. Ĉi-foje tiu stacio estis sufiĉe bone aŭdebla. La "Reichsbrücke-ponto" kaj ĝia falego ankoraŭ furoras en la Esperanto-elsendo, pri ĝi temis la felietono de d-ro Beckmann. Kaj eĉ la semajna komentario, ĉi-foje denove de d-ro Karl Macher, ree tuŝis tiun problemon.

Svisa Kurtonda Servo. La elsendoj de tiu stacio okazis laŭ nia antaŭanonco en n-ro 32. - Pro spacomanko ni devas ĉi-foje limigi ĉi tiun rubrikon!